


Memore al Li Shijun

En la 10a de novembro forpasis en aĝo de 87 jaroj en Ĉinio, s-ro Li Shijun (plumnomo Laŭlum). Li fariĝis Honora Membro de ILEI dum la julia Konferenco de la Ligo, en Kunmingo, rekone al vivo dediĉita (interalie) al edukado kaj antaŭenigo de la instruado de Esperanto.



S-ro Li naskiĝis en 1923, lernis Esperanton en 1939, laboris kiel instruisto de la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanto en mezaj kaj superaj lernejoj; ĵurnalisto, tradukisto, vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, *La Mondo* kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo, estro de Ĉina Esperanto-Instituto, membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA, honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj honora komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Lia fekunda verka kariero estos omaĝita vaste tra la movado, sufiĉas noti ke li tradukis plurajn elstarajn romanojn, epopeon kaj dramojn, kaj mem verkis centojn da poemoj, noveloj, fabloj, eseoj kaj recenzoj, kiuj aperis en gazetoj en- kaj ekster-landaj.

Li gvidis diversajn Esperantajn kursojn por komencantoj aŭ instruistoj kaj verkis aŭ kompilis diversajn lernolibrojn de Esperanto; inter kiuj: Lernolibro de Esperanto (1949), Nova Vortaro Esperanto-Ĉina (kune kun aliaj 1959), Esperanta Konversacio (1964), Unua Ŝtupo de Esperanto (1983), Esperanto-Kurso por Memlernado (1984), Nova Kurso de Esperanto (1986), Esperanta Antologio (kune kun aliaj, 1988), Esperanto-Ĉina Vortaro (kune kun aliaj, 1990), 222 Simplaj Versaĵoj por Komencantoj (1994), Pri la Traduka Arto de Esperanto (kurso 1997), Cent Jaroj de Esperanto en Ĉinio (kune kun aliaj, 1999) kaj 250 Rakontoj pri Afanti (en versoj). Li kompilis Gvidlibron de Esperanta Konversacio (2001), Esperanta Vorareto por Lernantoj (parte aperinta en *La Movado*, 2002-2003), ilustritan per preskaŭ 4000 versaĵoj por helpi la lernantojn kaj lernolibrojn pri la traduka arto kaj literaturo de Esperanto.

ILEI etendas sincerajn kondolencojn al lia familio kaj al la esperantistoj en Ĉinio kaj al nia propra ILEI-sekcio en Ĉinio.

Stefan MacGill
Prezidanto de ILEI